

Protokolo estrara - Hago

Kunsido Julija Batrakova (JB – kasisto de ILEI) kaj SMG en Haga urbodomo, la 15an de januaro, 2010. Dissendita tuj poste al ĉiu estrarano.

[\(Komentoj kaj kompletigoj SMG blue, la 27an de oktobro, 2010\)](#)

Registri membriĝojn 2010:

Proponite ke MK prizorgos la centran registron kun kiel eble plej multaj informoj, en decidota formato (Excel aŭ tabelo en Word) kaj disponigu ĝin regule al JB kaj SMG.

Proponite ke SMG malfermu membro-vikion, samloke kaj simile al tiu de Juna amiko [\(Farite\)](#). Tie aperu nur familiaj nomoj kaj urboj, la aranĝo estos laŭlanda, anoncovojoj kaj pagoj estu notitaj, kiel ankau postsendoj, se necese. SMG, JB kaj MK estu rajtigitaj aldoni aŭ ŝanĝi datumojn. Post pretigo sekcioj rajtu ĝin enrigardi por kontroli la datumojn. [\(Tio neniam okazis, ĉar ĝia stato ne sufiĉe evoluis por ebligi tion\)](#)

Proponite ke JB estu nia nomita homo por rilati kun FEL, ĉefe pri la ĝisdatigo de ilia adresaro, surbaze de materialoj ricevataj de MK. Tio pro la proksimeco de JB al Antverpeno kaj la eblo fizike viziti la sidejon, renkonti la deĵorantojn kaj solvi eventualajn problemojn. JB povos eble ricevi de FEL ilian ekspedoliston por kontroli kontraŭ niaj. SMG petos tion. [\(Okazis maje\)](#).

MK daurigu la prizorgon de la retaj membroj, kun interna cirkuligo de la listo de ricevantoj.

Atentu ke abonintoj el 2009 ricevas numeron 2010/1, kune kun novaj membroj.

Senpagaj ricevantoj

SMG provos akiri la liston de senpagaj ricevantoj kaj kvantoj kaj ĝisdatigos ghin. [\(Ni ricevis sed ne multe ĝisdatigis – modesteco de aborfotoj\)](#)

Transigo de informoj

Atiljo atendeble revenos al NL en la semajnfino. En la sekva semajno JB renkontis lin, por ekscii i.a. kiuforme peri la adresar-korektojn al FEL, kiaj pliaj membrolistoj kaj utilaj dokumentoj povus ekzisti. [\(Sekvo malcerta\)](#).

Fondusoj kaj kasoj

JB sendis priskribojn de iuj fondaĵoj al SMG, kiu retrovos kaj prilaboros ilin. [\(Tekstoj aperis reteje, sed estas ĉiam bonigeblaj\)](#). Ni eble uzas la vorton 'fondaĵo' tro leghere, laŭ nia scio nur fondaĵo Erika Linz estas vera fondaĵo en la jura senco, tiel ke ILEI mastrumas sed ne proprietas ĝin. [\(Poste ni eksciis, ke eĉ tio ne veras. La fondaĵo ekzistas pure laŭ la buŝaj deziroj de la fondinto kaj ne havas juran bazon\)](#). Fondaĵoj Interkulturo kaj Flugiloj estas malklaraj, ĉar la mastrumado estas dividata, necesas ekscii precize kun kiuj kaj kiuj estas la celoj kaj rajtoj de ILEI kompare kun tiuj de aliaj partioj. La 'fondaĵoj' Afriko, Szerdahelyi, Dazzini kaj Koleghelpa ŝajnas aparteni en la praktiko al ILEI, ĉar ni starigis ilin kaj rajtas foruzi la sumojn por la indikita celo. Se ili estus veraj fondaĵoj ni ne proprietus ilin. JB esploras – eventuale ni eknomu ilin kasoj. [\(Nun, ni uzas la vorton 'Fonduso' aŭ 'Kaso'\)](#)

Laŭ la bilanco 2008, la kapitalo de ILEI ŝrumpis de ronde 80KEUR ĝis 65K, eble parte pro kurzoperdoj kaj foruzoj. [\(En 2009 rekreskis ĝis 70K EUR\)](#). Ne eblas scii la sumojn fine de 2009. [\(Tiam, ne eblis!\)](#) Niaj imagoj tre ronde [\(nun kun la rezultoj aldonitaj\)](#):

Propra kapitalo (nete): 16,000 [\(15,399 EUR fine de 2009\)](#)

Fiksa kapitalo (Linz): 16,000 EUR [\(171,104 SEK, proks 16,000 EUR\)](#)

Afriko: 7000 – 3000 en 2009 = 4000 (7241 EUR, do pli bone ol imagita)

Dazzini (konferenc-subteno): 1200 + 1875 = 3000 (2667 EUR)

Flugiloj: 2000 (2105)

Interkulturo: 9000 fine de 2009? (planate elspezi en 2010 3K+3K = 6K) restus 3.000
(tamen 10,541 EUR)

Koleghelpa kaso: 582 (sufichus por eble 30 B-landaj membrigoj)
(tamen 702 EUR fine de 2009, forte kreskis la uzo en 2010)

Szerdahelyi: 2800 – 500 = 2300 ? (2683 EUR)

Sume nia kapitala bonhavo ŝajnas kuŝi ie inter 50,000 kaj 60,000 euroj. (fine de 2009, rezultis 69,950 EUR kun revizoritaj rezultoj el Nederlando, sed ne el Svedio). Tri bonaj matenmanĝoj por UEA. Multaj landaj asocioj havas pli ol tio.

Koleghelpa kaso:

JB cirkuligos liston de la nunaj subtenatoj. (Okazis). Gravus rezervi 5 por Armenio (fondota sekcio), (Okazis) 5 por Irano (sekcio devas vivsigni, por ne perdi sekcio) (ne okazis, subteno ne donita), eble tri por Pakistano (ne uzitaj), iuj por Kongo (5 por ekesti sekcio) (okazis, sekcipeto atendata) kaj certe estas multaj pliaj. SMG faros alvokon por tiu fondaĵo, kune kun la ĝenerala varbado. (Ne sukcesis okazi, KhK membrigoj fine organizitaj nur en majo, nova kampanjo okazos fine de 2010 kun decidoj januare/februare, kiel difinas la regularo).

Kontoj 2009

Ne eblas fermi la spezokontojn aŭ pretigi bilancon aŭ scii la jarfinajn sumojn de fondaĵoj, ĉar ni ne ricevis el Svedio la finkalkulon de la krakova konferenco (venis julio 2010) kaj la ĝenerala spezaro por la lastaj ses monatoj de la jaro. La afero urĝas ĉar ĝis fino de marto ni devas liveri la kontojn por revizado (iris aŭguste, farita por NL), kaj la manko bremsas nian kapablon fari financajn decidojn pri 2010 (efektive).

Bankokonto en Nederlando

La dokumentoj estas dontiaj, la konto devos esti preta post 10 tabortagoj. (Okazis en malpli ol 10 tagoj). Ni bezonas tion por niaj varbiloj. Tiam ni devas doni klarajn instrukciojn al sekcioj kiel komuniki membriĝojn. (Okazis)

Manlibro

Ni atendas ricevi stokon de IEI fine de januaro, kiuj transiros al JB. (Okazis). SMG ricevis nun 10. Laŭmemore ni ricevis kaj vendis ĉ. 30 en la konferenco, sed ne scias kiu havas la monon pro tio. Eble la ĝistiamas kasisto. (Restas mistero). Stokoj vendiĝis dum UK, Arkones kaj la UAM-sesio, sed ni ne scias kiom kaj kien iris la mono. (Bonigenda praktiko – zorge librotenu la UK-vendojn kaj surlokajn vendojn. Temas esence pri akiro de pli da laborfortoj – tasko por honorarioto – kiel antaŭvidas buĝeton 2011). Origina plano estis sendi stokojn al Herzberg, sed verŝajne tio ne okazis. (Tiam ja ne okazis, poste okazis en majo 2010 el la stoko reakirita el Hago).

Lernu gramatiko (fariĝis ‘Detala Gramatiko de Esperanto’ (DGE) de B. Wennergren)

JB elshutis la materialon (211p) kaj sendos la PDF al SMG. (Okazis) Minimume la titolo bezonas atenton. Ni devas zorgi mastrumi niajn stokojn. Ni ja akceptis kontribui mil eŭrojn por fariĝi kuneldonanto, kontraŭ tio ni ricevos 166 ekz. (triono de 500). Ni proponas pagi 500

anticipe kaj 500 post ricevo de la stoko. (Baldau pagota. Libro aperis Julie, ni imagas ricevi stokon al Herzberg novembre – ĉ. 5 ekz. estas ricevitaj). Dezirindas fiksi komunan vendoprezon, kiun ankaŭ UEA uzu. SMG opinias ke tio devas esti almenaŭ 12 eur (sendokostoj aldone). Tio, ĉar ni devas doni trionan kvantrabaton al UEA kaj aliaj revendistoj. Por solvi la demandon kiu el la tri eldonantoj vendu al UEA, ni proponas ke ĉiu partio ricevu 150 ekz., tiel ke restu 50 ekz. por oferti komence al UEA, kun la enspezo de tio dividata inter la tri partioj. Se UEA poste volas pli, ĝi povas turni sin al iu ajn el la partioj. (Propono neniam sekvi, restas malklara kiu vendos al UEA, la ideo de komuna vendoprezado ŝajnas tro malfacila por realigi. ILEI bezonas apartan komisiiton pri eldonado, kiu ne havas samtempe aliajn taskojn en la Ligo.)

Libroservo kaj financo

Konsentite ke nur Julija eldonas fakturojn. Se SMG aŭ ZK aŭ iu ricevas libromendon plenumbla ĉe si, necesas sendi ĉiujn informojn al JB kiu pretigos la fakturon kaj resendos ĝin elektronike. SMG/ZK/iu povas tion elprinti kaj aldoni al la librosendaĵo.

SMG proponas al la estraro de ILEI ke ekde nun la libroservo de ILEI aldonu 10% pro sendokostoj kaj ofertu ĝenerale nur sesonan rabaton ekde 3 ekzempleroj. (Simile al UEA). Evidente ni al UEA kaj grandaj libroservoj devos donadi trionan rabaton. (Ankoraŭ ne praktikata, verŝajne okazos ekde 2011.)

SMG promesis inventari la malnovajn librojn en Bp (ni vidu ĉu tio okazos). Se ne, la valoro komence de 2010 estu 400 eur, kaj la jara deskribo 80. (Inventaro ne okazis, nek povos.)

Fino de produktiva duhora diskuto por glatigi la financon kaj administrant funkciadon de la Ligo.